



STRATEGIA PLANO
2021-2025

tejo

Dum la Estraro kaj Komitato kreas ĉi tiun dokumenton, kelkaj landoj spertas sian unuan pandemian enŝlosiĝon, kaj kelkaj atendas plian enŝlosiĝon. La junularo iras surstrate por protesti pri klimatsanĝo. Klare estas tre grave en nia epoko kune labori por alfronti komunajn defiojn, kiuj ofte ne konas landlimojn. Por sukcesi en ĉio ĉi, ni bezonas komunan lingvon por atingi niajn komunajn celojn por paco kaj daŭripovo. TEJO de sia fondiĝo laboras por koaguli la diversecon kaj la unuecon en la mondo, por solvi la lingvan ĥaoson en internaciaj rilatoj kaj por faciligi la komunikadon inter homoj de plej diversaj medioj. Ĝi estas unika tutmonda junulara organizo; sed ne al ĉiuj estas klare, kiel la organizo agadas kaj kiel ĝi funkcias. Tial, en ĉi tiu strategio por la venontaj jaroj, ni sagas al la celoj komunikado, travideblo kaj kompreneblo. TEJO estas kunlaboro inter sekcioj landaj kaj fakaj kaj multaj individuaj membroj, kiuj komune kreas ion pli riĉan kaj enhavan ol nur internacian kunlaboron. Komune, ni laboras per rajtbazita aliro por egaleco, konstruas pacon cele al floranta socio, kaj fokusas niajn klopodojn plu pri homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo. Estas grave zorgi ne nur pri funkcia, daŭripova organizo, sed ankaŭ meti la valorojn de TEJO en la fokuso. Tial, la celoj por 2025 estas facetitaj laŭ la kernaj ecoj de TEJO: tutmondeco, Esperanto-orientiĝo, junular-orientiĝo kaj organizaj temoj.



Tutmonda

Kiel TEJO povas subteni Esperantajn junularajn voĉojn en ĉiu mondoparto?



Esperantista

Kion ni faras por vastigi Esperanton, egalecon kaj lingvajn temojn?




Junulara

Kiel TEJO laboru pri temoj specifaj al junaj esperantistoj kaj iliaj rajtoj?



Organizo

Travideblo, kompreneblo, daŭripovo kaj kunordigaj temoj.



Esperanton oni vaste kaj tutmonde konas kiel taŭgan solvon al la lingva problemo. La tutmonda Esperanto-junularo kapablas agi kaj krei pli bonajn sociojn laŭ sia vasta spertaro. TEJO estas kunlaborreto por la tutmonda Esperanto-junularo kaj la junularaj organizoj kaj asocioj tutmonde.

CELOJ KAJ VALOROJ

Kreante kaj plenumante ĉi tiun Strategian Planon, la organizo devas rememori siajn originajn celojn kaj valorojn. La celoj de la organizo estas registritaj en la [Statuto](#), sed ili estas vivantaj valoroj, kiuj gvidas nian ĉiutagan laboron.

Laŭstatute, la celoj de TEJO estas:

1. *disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;*
2. *kontribui al la evoluo de la Esperanta kulturo;*
3. *agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;*
4. *plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, genro, genra orientiĝo, religio, politiko aŭ lingvo;*
5. *helpi la junularon havi aktivan rolon en konstruo de socio daŭripova, inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta;*
6. *kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, disvolvante ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj;*
7. *plibonigi la konojn kaj organizajn kapablojn de siaj aktivuloj kaj instigi ilian kulturen evoluon; kaj*
8. *liveradi junajn fortojn al la Esperanta movado.*

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- A. *informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto;*
- B. *praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj;*
- C. *okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj; kaj*
- D. *instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado*

Por la agado de TEJO esencaj kondiĉoj estas:

1. *bonaj internaciaj rilatoj;*
2. *respekto de la homaj rajtoj tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj; kaj*
3. *daŭripova evoluo laŭ la difinoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj.*



TUTMONDA

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

*Ĉefcelo: TEJO estas **tutmonda** esperantista junulara organizo. En la jaroj 2021-2025 TEJO volas koncentriĝi pri la tutmondeco de la organizo kaj pri la engaĝado kaj kunlaborigo de la landaj sekcioj de ĉiu kontinento en la agado de TEJO, en komisionoj, en projektoj, en kongresoj.*

1. TEJO strebas en sia agado reprezenti kaj kunigi vastan tutmondan junularon. Parto de tio estas la starigo de egalecplano pri la kernaj agadoj de TEJO, kun fokusiĝo pri tutmonda reprezentado kaj alireblo al kongresoj.
 - a. En la egalecplano estas difinata la starigo de egaligaj strukturoj, kiuj helpas al solvado de konfliktoj kaj packonstrua laboro en la movado, kiuj ankaŭ subtenas la povigon de grupoj kun malavantaĝoj.
 - b. La jaraj raportoj enhavas datumojn pri deven- aŭ loĝlando kaj genro de la partoprenantoj en agadoj, kongresoj kaj komitatkunsidoj, por ebligi komprenon de la reprezentado.
 - c. Kongresoj ĉiam enhavas retan partopreneblon; esplori kaj efektivigi pli da retaj servoj al la membraro.
 - d. Okazigi interkontinentajn projektojn, aldone al fizikaj renkontiĝoj, esplorante la retajn eblojn kunlabori kaj tiel plifortigi la lokajn movadojn.
 - e. Unu evento organizita de TEJO ĉiun jaron ligita al malsama kontinento ekster Eŭropo dum 2021-2025. Ni kunorganizu lokajn kaj internaciajn kongresojn en la tuta mondo kaj uzas niajn komisionojn kaj nian fakan agadon por realigi tiajn celojn. TEJO varbas partoprenantojn kaj subteno la organizadon en renkontiĝoj tutmonde. Okazas faka konsilado aŭ monsubteno pere de Fonduso Trampolino.
 - f. Videbligo de Esperantaj eventoj kaj eventoj de landaj kaj fakaj sekcioj en la retpaĝo kaj ligilo al Eventa Servo.
 - g. Eksteraj komunikoj de TEJO atentigas egale reprezenti ĉiujn mondopartojn, genrojn, aĝojn, ktp.
 - h. Subvencipeti por okazigi interkontinentajn projektojn kaj pledi ĉe EU por subteni junularan interkontinentan kunlaboron.
2. Komunikado kun kaj helpado de Landaj kaj Fakaj Sekcioj estas regula kaj daŭripova.
 - a. Parto de tio estas prioritatigi agadon en komisionoj laŭ la bezonoj de la landaj kaj fakaj sekcioj. La komisiono pri landa kaj faka agado regule kunsidas kaj raportas al la estraro.
 - b. Parto temas pri la aktiva partopreno de la sekcioj en la komitato. En 2020 estas 26 Landaj Sekcioj kaj du Fakaj Sekcioj reprezentitaj en la komitato; en 2025 estas almenaŭ 5 pli; unue 3 ĝis 2023, kaj 2 aldonaj ĝis 2025. Ni havas klarajn informojn pri aktiveco kaj grandeco de Landaj kaj Fakaj Sekcioj.
 - c. Subteno de la starigo de almenaŭ 5 novaj landaj aŭ fakaj sekcioj, plejeble tutmonde.

3. Starigo, ekfuncio kaj daŭripovigo de tutmonda Mentora Programo en almenaŭ tri kontinentoj. La mentora programo kreas ligojn inter aktivuloj kaj helpas la viklecon en loka agado. Ĝi kreas daŭripovon per transdono de scioj de pli spertaj aktivuloj al malpli spertaj. Samtempe, ni koncentriĝas ankaŭ pri interesanĝoj de spertoj kaj praktikoj inter samnivelaj aktivuloj de la tuta mondo. Lanĉado dum 2020-21 kaj ĉiujare la mentorado enplektas pli da aktivuloj el pli da kampoj.
4. Starigo de tradukteamo por TEJO-kanaloj kaj TEJO-komunikadoj taŭgaj por naciaj lingvoj. Subtekstoj en Esperanto sub ĉiuj memproduktitaj filmetoj, kaj subtekstoj en tri aliaj lingvoj sub filmetoj kun ekstera celpubliko.
5. Plani por la estonteco por iĝi pli tutmonda kaj daŭripova.
 - a. Starigo de klimatplano pri la kernaj laŭstatutaj agadoj de TEJO. Starigo en 2021, pritakso kaj ĝisdatigo en 2023.
 - b. Labori por packonstruado kaj egaleco en la mondo (ekz. publike anonci peton por ĉesado de konfliktoj). Konsideri tiajn temojn en nia ĉiutaga laboro kaj disvastigi idealajn praktikojn tutmonde.



ESPERANTISTA

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

*Ĉefcelo: TEJO estas tutmonda **esperantista** junulara organizo. En la jaroj 2021-2025 TEJO volas koncentriĝi pri esperantistaj kernceloj. Informado, disvastigo de Esperanto kaj edukado en Esperanto por junuloj.*

1. TEJO kontribuas al la disvastigo de Esperanto pere de kolektado kaj alirebligo de instrumaterialoj, varbmaterialoj en multaj lingvoj kun klara gvidado pri ilia uzo. Ni okazigas pritemajn renkontiĝojn. Ni vidas la modelojn de aliaj organizoj.
2. TEJO pli vigle kaj regule uzas por sia komunikado jamajn kaj novajn rimedojn, precipe sociajn retojn kaj videojn. Tion ĝi faras specife por atingi ne-membrojn kun bunta resumo de la agado dum la jaro, kio inkluzivas regulan raporton pri tio, kion TEJO faras por Esperanto - la lingvo kaj la kulturo.
3. Konsciigo de junuloj pri la Esperanta kulturo, kaj subteno de la Esperanta kulturo kaj kunlaboro kun aliaj organizoj kiel ILEI. Reklamado de Fonduso Trampolino por kulturaj projektoj. Regula komunikado pri eventoj, kanaloj kaj okazaĵoj rilate al kulturo en la movado kaj ebloj edukiĝi en Esperanto.
4. Enkonduko de jartemoj, elektita de la komitato, kiuj kongruas kun la temo de la Internacia Junulara Kongreso, por subteni tutmovadajn diskutojn pri la temo. Kiam estas taŭga, ili povas esti elektitaj ligite al la jartemoj de Unuiĝintaj Nacioj. TEJO kreas kongresajn rezoluciojn pri la temo.
5. Plifortigu la Esperantan komunumon per regulaj retaj kaj ne-retaj iniciatoj kun aparta atento al novuloj, dum ĝi subtenas ankaŭ aliajn iniciatojn, precipe novajn.
6. Disvastigo de valoroj kongruaj kun la statuto de TEJO.
 - a. Verki poziciajn/politikajn dokumentojn kaj kongresajn rezoluciojn kaj artikolojn. La temoj povas esti paco, egaleco, daŭripoveco, demokratio, homaj rajtoj kaj aliaj kongruaj kun la statuto de TEJO.
 - b. Plifortigi la aspekton de lingvaj kaj homaj rajtoj en la kunlaboro kun aliaj organizoj tutmonde. Ni plifortigu kunlaboron kun organizoj kun kongruaj celoj.



JUNULARA

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

*Ĉefcelo: TEJO estas tutmonda esperantista **junulara** organizo. En la jaroj 2021-2025 TEJO volas koncentriĝi pri temoj kernaj por la junularo kaj junulara aktiveco en la Esperanto movado.*

1. Aktiva engaĝiĝo en junularaj organizoj tutmonde
 - a. Junularaj organizoj akceptas Esperanton kiel laborlingvon tiam, kiam ĝi montriĝas taŭga. TEJO estas konsiderata kiel fidinda partnero en tiaj kunteksto.
 - b. Rekte engaĝigi niajn membrojn en la Universala Perioda Revizio de la Unuiĝintaj Nacioj tra niaj membraj organizoj.
 - a. Klerigo pri aktualaj temoj pri junularaj rajtoj per Esperanto.
2. Kreas eblon kaj lokon, por ke TEJO-membroj povu partopreni politikajn diskutojn kaj konektiĝi al gvidantoj pri sia vizio por la tutmondaj socio kaj junularo.
 - a. Kreas spacon por junuloj kaj TEJO-membroj temantan pri politikaj diskutoj tutmonde.
 - b. Kreas junularajn dialogojn kun politikistoj kaj gvidantoj.
 - c. Kreas ligojn kun aliaj organizoj.
3. Krei glate funkciantan kunlaboran strukturon por niaj junaj membroj.
 - a. Instigi novajn junajn Esperantistojn al membriĝo en TEJO.
 - b. Instigi novajn membrojn preni aktivan rolon en la organizo.
 - c. Certigi ke novaj aktivuloj havas ĉiujn rimedojn kaj helpon por spertiĝi kaj efike plenumi sian rolon. La komunikado inter respondeculoj pri ĉiuj tri paŝoj iras glate kaj efike.
 - d. Atingi, kunigi, helpi, enplekti nian periferian membraron, la malpli movademajn junulojn; kaj ankaŭ aktivajn junulojn ekster TEJO.
4. Atingi ke la Junaj Amikoj de TEJO funkcias senbare kun regula duflanka komunikado.
 - a. Plifortigante la membrokategorion pere de niaj nacilingvaj eventoj.
 - b. Starigi regulan informilon por sciigi ilin rete pri nia agado kaj Esperanto.
 - c. Ni instigu la Junajn Amikojn de Esperanto iĝi individuaj membroj kaj membroj de landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO.



ORGANIZO

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Ĉefcelo: TEJO estas tutmonda esperantista junulara **organizo**. En la jaroj 2021-2025 TEJO volas koncentriĝi pri la trasideblo, kompreneblo kaj daŭripovo de la organizo.

TEJO estas trasidebla, komprenebla kaj daŭripova organizo:

1. Restrukturizado kaj trasidebleco de la financoj:
 - a. Financaj raportoj estas publikigitaj en pli facilaj formatoj en la retpaĝo;
 - b. Trasideblo en la verkado de buĝeto, bilanco, kaj spezokontoj;
 - c. Klara raportado pri kiel estas uzataj la membrokotizoj;
 - d. Facile alirebla aliĝilo, ekzemple per AKSO aŭ alia reta sistemo;
 - e. Diversigi eksterajn enspezojn de TEJO, trovi novajn rimedojn ĉe diversaj privataj kaj registaraj fondaĵoj.
 - f. Enspezas pli regule kaj valore de la enmovada aktiveco per profitdonaj renkontiĝoj, donacoj, patroniĝoj, vendoj, kaj pli detala kotizsistemo, kiu varias ankaŭ laŭ la aĝspektro en TEJO.
 - g. Financa daŭripovo: esploras la temon, pensante pri la kasista mandato, kiel krei buĝeton, bilancon, aŭ spezokonton.
 - h. TEJO aktive serĉas profitan investebilon por sia kapitalo
 - i. Provadi malaltigi la kostojn por oficistoj kaj volontuloj
 - j. Malaltigi kostojn de la estraro, ĉefe de fizikaj estrarkunsidoj
2. Organiza strukturo
 - a. Enretigo kaj aŭtomatigo de organizaj sistemoj: la retaj sistemoj de TEJO funkcias glate, daŭripove kaj estas ĝisdataj (retejo, membroadministrado, datumujoj, komunikiloj, retpoŝtsistemo, financa sistemo).
 - b. Pli kompleta superrigardo de taskoj kaj aktivuloj, ekzemple per Slack.
 - c. La Reglamente iĝas pli facile legebla, pli mallonga, pli fleksebla, taŭga por retaj proceduroj
 - d. La Komitato laboras pli efike, pli en laborgrupoj, pli decidas kaj malpli preparolas dokumentojn, pli efike dividas taskojn kun estraro kaj aliaj organoj
3. Ĉiujara spertigo de novaj estraranoj kaj atingo de daŭripoveco de Estraro. Daŭripova mastrumado de estraro (transdono, kapabligo, daŭripova laborado, bonfarto)
 - a. Instrurondoj pri Financoj kaj taskoj de la Ĝenerala Sekretario;
 - b. Esploro pri la daŭripovo de la estrara mandato: pritakso de la unujara kaj la dujara (alterna) mandato, analizo de sistemoj de reelekto, rekonfirmo kaj aliaj prepartempoj.
 - c. Transira trejnado por plifortigi la novan estraron kaj certigi akuratan kaj plenan transdonadon de scioj kaj taskoj.
 - d. Manlibro pri ĉiu posteno en la organizo, ĉefe pri estraraj roloj

4. Daŭripova mastrumado de homforto en TEJO
 - a. Volontuloj: starigo de pliaj volontulejoj en Eŭropo; esplorado pri tutmonda reta volontulado,
 - b. Volontuloj havu pli specifajn, personajn taskojn
 - c. Esploro pri dungado de longtempaj oficistoj kaj kunordigado de volontuloj.
 - d. Esplori la eblon oferti staĝojn, ĉeestaj kaj retaj, ĉe TEJO.
 - e. Disvolvigo de erarakcepta kaj regenera kulturo.

5. Kontribui al la daŭripoveco de la ĉefsidejo de TEJO, inkluzive la libroservon kaj volontulejon; kunlabora plimodernigo kaj daŭripovigo de la libroservo de UEA.